



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 168

Aprilo 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



## INCUBUS NE ESTAS FILMO POR ESPERANTISTOJ

recenzas Bob Williamson

**Incubus** (1965) 76 min., nigra kaj blanka, verkis kaj direktis Leslie Stevens; Roluloj: William Shatner, Allyson Ames, Eloise Hardt, Ann Atmar, Milos Milos; produktisto: Anthony Taylor, kinematografisto: Conrad Hall; komponisto: Dominic Frontiere.

Temas pri profesie farita filmo tute en Esperanto, la sola farita ĝis nun en Usono! Tiu devas vekti la atenton kaj intereson de ĉiu esperantisto. Inter la geaktoroj troviĝas eĉ William Shatner, mondfama pro sia pliposta ĉefrolo de Kapitano James T. Kirk en la televida kaj filma serioj *Star Trek (Stelmigrado)*. Multaj Esperantistoj multe dezirus vidi lin roli en la internacia lingvo. Tiel ankaŭ mi pensis antaŭ ol mi vidis la filmon, sed poste mi opinias ke *Incubus (Inkubo)* vere ne estas filmo por esperantistoj. Tiuj, kiuj tamen deziras vidi la filmon prefere prunteprenu ĝin kaj evitu la grandan elspezon.



Diversaj kialoj allogas nin al filmo, inter ili la rakonto, la geaktoroj, kaj la aspekto de la filmo. La filmon verkis kaj direktis Leslie Stevens, kreinto de la televid-serio *Outer Limits (Foraj Limoj)*, kaj la rakonto similas al epizodo de tiu serio, kiu temis pri eksterordinaraj kaj eĉ hororaj okazaĵoj. Kia (pr. Kaja) (Ames) estas sukubo, bel-aspekta diablino kiu allogas malvirtulojn kiel unuan viron al la maro kaj dronigas ilin sub la piedo. Sed ŝi ne estas kontenta. Ŝi deziras uzi la povojn por detruigi virtan heroon. Fratin-sukubo (Hardt) avertas ŝin pro la forta povo kiun virtuloj nomas amo. Sed la memfida Kia serĉas heroon por detruigi, kaj trovas Marko-n (Shatner) kun sia fratino (Atmar). Tuj komenciĝas la batalo inter bono kaj malbono, sed esploro de tiu temo neniam plene disvolviĝas. Kiam Kia fiaskas

kaj komenciĝas enamiĝi kun Marko kiel li enamiĝas al ŝi, ŝi kaj la fratino alvokas diablan inkubon (Milos) el la grundo por perforti la fratinton de Marko kun la intenco malvirtigi lin kaj instigi lin al murdo pro venĝo. Je la fino, la fratino jam mortis sed Marko sukcesas savi sian animon en la preĝejo, kaj ankaŭ helpas savi la animon de Kia, la amatino. Ni ne estas certa kial. Jen la stranga rakonto el alia epoko.

La filmo estas bone, eĉ bele fotografita. Ĉi-monate la kinemato-grafisto Hall gajnis duan Oskar-premion pro sia laboro en *American Beauty* (*Amerika Beleco*). La rakonto okazas en nedefinita tempo kaj en pejzaĝa regiono apud la maro. Kvankam oni intencis ke la etoso estu minacema, la manko de koloro en tiel bela regiono aspektas anakronisma kaj forprenas de la lertaj efektoj konataj de Hall. Oni jam vekis senton de minaco kun la tre efika muziko de Frontiere, kaj tiu intenca neuzo de koloro ne helpas la filmon, laŭ mia opinio.



Kompreneble, la ĉefa allogo por ni estas la uzado de nia lingvo. En intervjuo por Usona Nacia Publika Radio (NPR) la produktisto Tony Taylor donis la kialon por la uzo de Esperanto. En tiu epoko oni celis trovi spektantarojn en artaj kinejoj, kie ofte troviĝis alilingvaj filmoj de direktoroj kiel la svedo Ingmar Bergman. La intenco estis krei alilandan, alimondan etoson, sed sen rilato al rekonebla nacio. Tial oni elektis Esperanton kiel lingvon kiun neniu komprenos. Oni ne intencis ke la lingvaĵo estu komprenata de iu ajn, kaj oni preskaŭ sukcesis eĉ kun Esperantistoj. La malabunda dialogo mem ne estas aparte malbone verkita, sed evidentiĝas ke la geaktoroj ne havis sufiĉan tempon aŭ helpon de parolpova Esperantisto por scii kiel elparoli la lingvon. Malmultaj frazoj estas mezbone elparolitaj, plimultaj estas apenaŭ kompreneblaj. La lingvaĵo estas kvazaŭesperanto, kaj oni povas facile kompreni kial, je la unua prezento de la filmo, esperantistoj laŭte kaj tumulte plendis. Ili esperis aŭdi esperanton, kaj oni trompis la esperojn.

Lastatempe Taylor sukcesis trovi kaj restarigi la filmon, kaj nun li vendas kopiojn per la inter-reto. En la ret-paĝo li ankaŭ donas informon pri Esperanto, eble pro la fakto ke multaj esperantistoj interesiĝas pri la filmo. La halifaksa grupo jam aĉetis kopion de la vidbendo por la Libraro Ludovika. Ni devis pagi entute iom pli ol 75 kanadaj dolaroj (kosto por la kasedo, sendokostoj, valuta interŝanĝo, kanada impoŝto kaj doganaj kostoj) sed por Esperantistoj la filmo ne valoras la elspezon. Eble ĝi interesas aliajn homojn kiel Shatner-ŝatantoj kaj aliaj, kiuj ne scipovas la internacian lingvon, sed *Incubus* ne estas filmo por esperantistoj. Kiel la fratino-sukubo diris al Kia, „mi avertas vin!”

Plia informo (en la angla) troviĝas ĉe: [www.incubusthefilm.com](http://www.incubusthefilm.com)

**Rimarko:** Libroj, sonbendoj kaj vidbendoj en la Libraro Ludovika estas haveblaj por kanadaj Esperantistoj kiuj deziras ilin pruntepreni.

En la 2776a jaro de la unua olimpiko

Estimata Redaktoro:



En la decembra numero de *Inter Ni* vi atentigis nin pri diversaj kalendaroj, kaj en la februara numero Geoffrey Greatrex plue diskutis la aferon pri la elekto de la plej taŭga kalendaro sistemo. Lastatempe mi eksciis pri ankoraŭ alia metodo por kalkulado de tempopaso. Tiu estas la Juliana dato, en kiu oni simple nombras la tagojn ekde la unua de januaro en la jaro 4713 antaŭ Kristo. La unua de aprilo, 2000, ekzemple, estas juliana tago 2451635. Kvankam tiu ĉi sistemo estas tro maloportuna por ĉiutaga uzado fare de ordinaraj homoj, la astronomoj multe amas ĝin pro ties precizeco kaj oportuneco en la kalkulado de eklipsoj kaj aliaj astraj eventoj. Interese, ĉiu nova tago komenciĝas je tagmezo sur la nula meridiano en Greenwich, Anglio. La kialo de tio estas, ĉar la astronomoj povas precize konstati la sekunderon en kiu la suno transiras la nulan meridianon.

— Samideane salutas Steĉjo

## PRISKRIBO DE MIA ESPERANTISTA HISTORIO

fare de **FARKAS Antal**

Mi komencis lerni Esperanton en novembro de la jaro 1979 aŭtodidakte, per helpo de lernolibro (fare de Julio Baghy) kaj Esperanta-Hungara kaj Hungara-Esperanta Vortaroj. Helpe de tiu libro kaj la vortaroj, en 1980 mi komencis korespondadi. Mi havis multajn letergeamikojn el multaj landoj. Dum la jaro 1987, sinjorino Irene Szűcs instruis min kaj mian filon, kiu tiutempe estis 8-jara. Ankaŭ mia filo komencis korespondi kaj havis multajn korespondantojn, sed nuntempe li havas nur unu leteramikon.


Komence de 1990 en januaro renaskiĝis la rumana Esperanto-asocio (dum la komunismo ankaŭ Esperanto estis malpermesita) kaj komenciĝis kurso por komencantoj. En ĉi tiu jaro mi unuafoje povis partopreni en esperantistaj renkontiĝoj, ĉe la Hungara Esperanto-Kongreso kaj la Rumana Esperanto-Kongreso. Mia filo partoprenis en Esperanto-tendaro ĉe Kecskemét (Hungario). Mi kun mia familio vizitis letergeamikojn el Hungario kaj la tiama Ĉeĥoslovakio. En 1992 ni partoprenis en Venecio (Hungario) Komunan Kristanan Kongreson. Dum la venonta jaro, kun helpo de franca esperantisto (Martin Claude),

leteramiko de mia filo, mi kaj mia filo vojaĝis en Francio, Belgio kaj Germanio. Li sendis por ni invitilon kaj veturigis nin per sia aŭtomobilo. En 1996, mi kun la familio partoprenis en Szombathely (Hungario), en la 12a Ekumena Esperanto-Kongreso. En la somero de la sekvanta jaro ni partoprenis en la Unua Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro en Nigra Arbaro en Spechlock, Germanio. Je 1998 ni estis ĉe la dua Junulara Esperanto-Tendaro en Taize, Francio. En 1999 ni partoprenis en la tria Junulara Esperanto-Tendaro kaj la dekkvara Ekumena Esperanto-Kongreso en Gliwice, Pollando.

Per Esperanto mi gajnis multajn amikojn, kaj per ili mi sukcesis viziti kelkajn fremdajn landojn, kie mi konis nur esperantistojn.

Nun la situacio en mia lando iĝis tiel malbona, ke ĉi-jare mi ne plu povos vojaĝi aŭ partopreni en ia ajn esperantista renkontiĝo.

Antal Farkas loĝas en Oradea (en la regiono Transilvanio) en okcidenta Rumanio.



Noto de la redaktoro: Kvankam *Inter Ni* estas eldonita de Esperantista rondo en orienta Kanado, ni ĉiam bonvenigas artikolojn de niaj legantoj en diversaj partoj de la mondo.



**Ĉiuj advokatoj akiras malbonan reputacion nur pro la agoj de 99% el ili.**

**Mi eĉ mortigus por akiri pac-premion de Nobel.**

**Morgaŭ planu ke vi estos pli spontanea.**

**En la poŝto fakturoj vojaĝas duoble pli rapide ol ĉekoj.**

**42,73% el ĉiuj statistikoj estas laŭbezzone plukitaj el la aero.**